

---

# la **Espero**



**OPI NIO**

LA ESPERO  
SVENSKA  
ESPERANTOTIDNINGEN  
DECEMBER 1977

FONDITA EN 1913  
ISSN 0014-0694

★ **Cent** KLUBO  
SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO



Traduka  
konkurso:  
regularo

**La Espero**  
SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

*Carl Z*

**8**

Tack för i år!  
Vi ses nästa år igen!

Detta är årets sista nummer av *La Espero*. Nästa år kommer det också åtta nummer och vi i redaktionen ska försöka göra dem så intressanta och varierande som möjligt.

Det första du kommer att märka, när du får nästa nummer i februari, blir nytt utseende på första sidan; så tro inte att vi inte beaktar åsikter från läsarna (dvs dem som var missnöjda med första sidans utseende). Redan nu kan vi visa hur den nya vinjetten kommer att se ut. Så här blir den:



Annat får vänta till februari, för även vi i redaktionen vet ännu inte vad som kommer att stå just på sidan ett.

Förresten: trevlig helg till er alla!

## Rapportera! Andra vill veta vad ni gör!

*La Espero* publicerar ganska regelbundet nyheter om klubbarnas verksamhet. Fast inte regelbundet nog, tycker vi i redaktionen. Därför har vi skickat med senaste *Klubbinfo* ett formulär till alla klubbar, som de kan fylla i så fort något intressant hänt. Vi hoppas att så många klubbar som möjligt kommer att utnyttja det och rapportera fort!

## Prenumeration med rabatt

Mera om *La Espero*:

I början av året introducerades möjligheten att ge *La Espero* som gåvoprenumeration med en rätt så stor rabatt. Styrelsen för Esperantoförbundet har beslutat att ha den möjligheten kvar och att göra rabatten ännu större.



Du, som redan har *La Espero* som medlem eller prenumerant, kan gåvoprenumerera på tidningen för halva priset: **20 kr** för hela året!

Du får använda dig av denna rabatt, när du betalar prenumerationen för dina bekanta utomlands eller till olika 'instanser' i Sverige (väntesalar, läkarmottagningar, frisörsalonger o dyl).

När det gäller bibliotek försök att i första hand övertiga dem att själva prenumerera, till hel avgift, förstas.

Det enda som du inte kan göra med rabatt är att prenumerera för en privatperson i Sverige. Vi måste ha denna begränsning.

## Ett nytt sätt att stödja SEF

En ny «klubb» har bildats inom Esperantoförbundet. Det är en klubb som kommer att finnas bara på papperet. Medlemmar i den blir alla som vill stödja förbundet ekonomiskt genom att betala 100 kronor eller mera utöver sin ordinarie medlemsavgift. Därför har klubben fått namnet **Klubo Cent**.

Varför denna klubb?

Esperantoförbundet dras ofta med underskott. Det är tack vare olika gåvor från medlemmarna, testamenterade medel och dyl. som vi ändå fortsätter att ha en hygglig ekonomi.

Med en ökande verksamhet får vi också ökade kostnader. Det är alltså inte bara inflationen som driver kostnaderna i höjden. Det är just för att finansiera den ökande verksamheten som SEF behöver ett extra tillskott. Inte bara under 78 utan under ett större antal år. Så **Klubo Cent** är här för att stanna.



Det var medlemmarna på årsmötet i Falköping som kom med idén att förbundet borde ha en medlemskategori 'understödjande medlemmar'. **Klubo Cent** är lösningen på det beslut som styrelsen hade att verkställa.

**Klubo Cent** kan även uppfattas som 'klubben med hundra medlemmar'. Styrelsen hoppas, att det blir många fler!

Hur blir man medlem?

Det är hemskt enkelt: du skickar in hundra kronor (eller mer — fast också mindre belopp är välkomna) till postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet; ange att det gäller **Klubo Cent** 1978.

## SEF-avgifter för direktanslutna

I redaktionsrutan här intill står det vilka avgifter som gäller för

1978 för dem som är direkta medlemmar i Esperantoförbundet. Vid årsmötet i Falköping beslöt man om en avgiftshöjning. De nya avgifterna är följande:

direktanslutet medlem: 50 kr  
ungdomsmedlem under 26 år 25 kr

familjemedlem utan tidning: 15 kronor.

Den som är medlem i en förening ska inte bry sig om dessa avgifter, utan betala den avgift som föreningen har fastställt.

## Elektita LKK por Stockholm

Ankoraŭ ne ekzistas formala decido, ke okazos Universala Kongreso en Stockholm en 1980, sed jam ekzistas LKK por tiu eventuala kongreso. En oktobro la klubo de Stockholm elektis okmembran LKK, kiu post tio jam du fojojn kunsidis. En la unua kunsido estis dividitaj la taskoj.

Kiel prezidanto de LKK estis elektita Roland Lindblom el la klubo de Nynäshamn, vicprezidanto fariĝis Sven Alexandersson, Stockholm, kaj sekretario Ulla Luin, Tyresö. Anita Lindblom akceptis esti protokolesekretario kaj kasisto.

Estis nomitaj ankaŭ la unuaj komisiitoj: Gun Gerdman pri loĝado, Bertil Åkerberg pri ekskursoj, Birger Viggen pri postkongresaj aranĝoj, Franko Luin pri artaj aranĝoj kaj Ulla Luin pri enlanda informado.

La LKK ankaŭ pridiskutis la manieron labori. Intence la LKK restis malgranda, por povi efike kunsidi kaj decidi. Pri la plej gravaj taskoj estos formitaj laborgrupoj kun 3 ĝis 5 membroj en ĉiu, tiel ke entute eble 20 personoj okupiĝos pri la preparado de la kongreso.

## Traduka konkurso

tajpitaj paĝoj por prozo (ne pli ol 40 linioj po paĝo kaj 60 literoj po linio, proksimume).

La konkursaĵoj devas esti tajpitaj (sufiĉas unu ekzemplero) kaj akompanataj de kopio de la originala teksto kun klara indiko pri aŭtoro, libro, eldonejo kaj eldonjaro.

Por 1978 partoprenas ĉiuj, kies konkursaĵoj atingos la ĵurion antaŭ la 31a de marto 1978.

La premiojn decidas la estraro de Sveda Esperanto-Federacio kunlabore kun Eldona So-

cieto Esperanto.

La premioj estos disdonataj ĉe la jarkunveno de SEF en Uppsala.

Konkursaĵoj, taŭgaj laŭ kvalito kaj longeco, aperos en *La Espero*.

La konkursantoj partoprenas malkaŝe, sen pseŭdonimo.

La ĵurio estas la redakcia komitato de *La Espero*.

La konkursaĵojn oni sendu al *Traduka konkurso, La Espero, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede*.

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 00 Tyresö

Telefon: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom, Geoffrey Sutton

Prenumeration 1978: 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Sv. Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Sats: Esperantoförbundet

Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1977

## Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Högerv. 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift 1978: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem utan tidning 15 kronor

Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperanton* nytt ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

## Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Strönne

Medhjälpare: Wivi Nilsson  
Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

## Kvar konatoj jubileas en 1977

La 21an de decembro **Teo Jung** iĝos 85-jara. Li fondis *Esperanton Triumfontan* en 1920 (poste rebaptita je *Heroldo de Esperanto*) kaj redaktis ĝin dum 40 jaroj.

Teo ĵus festis ankaŭ sian gedziĝan oran jubileon.

En Helsinki jubileas (fakte jam pli frue) **Vilho Setälä**, ankaŭ 85-jara, akademiano, verkisto, vortaristo, eldonisto, enciklopediisto kaj esperantisto (de 1907).



En Vargön fariĝis 65-jara **Sune Ahlm**, direktoro de Eldona Societo Esperanto dum dek du jaroj, fondinto de la esperanto-klubo «La Aglo» en Karlskoga, antaŭa estrarano de SEF.

La 28-an de decembro amiko Ahlm emeritiĝas el sia posteno en la fer-industria branĉo.

**Åke Blomberg** sukcesis bone kaŝi la sekreton, ke li fariĝis 55-jara la 25-an de februaro ĉijare. Post sep jaroj li ĉijare forlasis la redaktadon de *La Espero* kaj dediĉas sian tempon al Eldona Societo Esperanto.

Ni esperas, ke li dum ankoraŭ longa tempo donos sian kontribuon al la progresigo de la movado.

Al ĉiuj kvar niajn plej since-rajn bondezirojn!

**Tiberio Morariu**

## Radio Västmanland diskutos esperanton

Lundon, la 2an de januaro ĉiuj, kiuj povas kapti Radio Västmanland, sidu ĉe sia aparato inter la 17.20 kaj 17.45. Tiam venos la programo «Ta pulsen på esperanto».

La programo enhavos mallongan enkondukon pri esperanto, kiun sekvos 20 minutoj da demandoj kaj respondoj. Vi povas esti unu el tiuj, kiu demandos, ĉar oni faros tion telefone. Tiuj, kiuj respondos al viaj inteligentaj demandoj estas Kaj Stridell, Victor Janheim kaj Ossian Pålberg.

Radio Västmanland havas la telefonnumeron 021 - 138160, sed aŭskultu la programon, ĉu tio estos la numero al kiu oni telefonu.

Oni rajtos telefoni ankaŭ se oni loĝas ekster la regiono de Radio Västmanland.



## Jubileo, kiu instigas al celkonscia agado

*Post mallonga tempo finiĝos 1977, kiu signis la 90-jaran jubileon de esperanto.*

*Pri jubileo oni povas havi malsamajn opiniojn: ke ili estas sensignifa manifestacio de organizo, kiu havas nenion pli sencan por fari — aŭ ke ili estas signo de bonfarto kaj vivoplenu.*

*Tiun ĉi jubilean jaron la esperantomovado ne speciale festis. Ĝin ĝi rimarkigis, iomete fanfaronis pri ĝi (ĉar oni ja povas fanfaroni fiere pri la 90-jara ekzisto de esperanto) kaj plulaboris. Mi opinias, ke tio estis la plej saĝa maniero trakti tiun ĉi jubileon.*

*Kelkaj jubileo sentiĝas pli signifaj ol aliaj. Tio evidente ne validis pri 90, sed certe ja validos pri 100. Kaj fakte aŭdiĝis en Rejkjaviko rimarko, ke oni jam nun devas plani por la centjara jubileo.*

*Mi trovas tiun rimarkon prava. Sed pli ol plani la festadon de la jubileo gravas plani la strategion de la agado ĝis tiam, tiel ke sentiĝas signife festi tiun jubileon. Ĉu tio sonas komplika?*

*Mi esprimu min pli simple: ni volas festi centjaran jubileon. Tion ni povas fari kun pli bona konscienco, se ni povas montri al konkretaj atingoj dum la lastaj jaroj antaŭ tiu jubileo (atingoj 50 jarojn malnovaj forgesiĝis intertempe kaj perdis sian signifon). Por atingi ion konkretan ni devas scii, kion ni volas atingi, plani la diversajn ŝtupojn de nia laboro kaj realigi ilin.*

*La estraro de SEF komencis pridiskuti longdaŭran laborplanon — ne kun perspektivo dekjara, sed por nun por proksimume duono de tiu periodo.*

*La celo de longdaŭra laborplano estas elekti inter la amasoj de diversaj agadoj tiujn, kiujn ni povas realigi, kaj vere dediĉi nin al ilia realigo. Sencela «saltado» de unu agado al alia malofte donas rezultojn; pri tio ĉiu el ni havas personajn spertojn.*

*Se estas nia intenco vere dece festi la centjaran jubileon de esperanto, ni ne rajtos tro multe «saltadi».*

Franko Luin

# Ĉu loko por esperanto en la sveda lernejo?

En 1978 okazos granda, aŭ ni diru almenaŭ sufiĉe radikala ŝanĝo en la sveda lernejo. Granda estis la laboro antaŭ ol la parlamento povis decidi pri la efektivigo de la nova reformo. La komisiono pri SIA (la interna laboro de la lernejo) produktis grandan 1000-paĝan esplorraporton.

— Kio estis la celo de la esplorado? Kiel oni volas, ke la lernejo funkcii?

Se mi per tre malmultaj vortoj menci la ĉefajn punktojn, mi unue montru la komunan lernejtagon kaj due la kontakton inter la lernejo kaj la vivanta socio ekster la lernejo.

Koncerne la unuan punkton oni substrekas la kunlaboron inter la lernejo, la socio, la gepatroj kaj la organizoj. Oni ankaŭ parolas pri «bona komuna vivo» kiel celo de la lerneja laboro.

Rilate al tiu ĉi lasta mi povas diri, ke la esperantomovado estus kaj eĉ estas tre konvena kunlaboranto. Bone kunlabori unu kun la alia, kunvivi pace kaj harmonie, kompreni unu la alian — tio ja estas parto de la interna ideo de nia movado. Oni konstatas, ke la celoj de la lernejo kaj de la esperantomovado estas similaj. Ĉu ni ne iel utiligu tion? Ĉu ni ne disvastigu nian scion pri la mondo, nian helprimedon al aliaj, kiuj havas saman opinion pri la vivmaniero? Sed kiel agi?

La SIA-esploro diras, ke la lernejo invitos la organizojn labori en la lernejo. Kiu pagos tiun laboron? Kiu ebligos tiun laboron? Dum du jaroj ĉie en la lando oni planas la lernejojn de SIA. Kiel dum tiu tempo, kaj ankaŭ poste, preparas sin la esperantomovado?

Ni havas ĉiam grandajn ideojn pri tutmonda disvastigo de esperanto, sed mankas mono kaj personoj por realigi la ideojn. Ni demandas al ni, ĉu ni provu kovri la tutan landon, aŭ ĉu ni

koncentrigu niajn fortojn al certa regiono kaj faru multajn diversajn aranĝojn tie. Dum la provtempo de SIA oni koncentrigis al kelkaj lokoj. Eble pro tio la rezultoj de la esploro fariĝis pli bonaj.



Krom la tiel nomata «libera agado», kiu okazas ekster la lerneja laboro, ekzistas ankaŭ la tiel nomata «libervole elektita laboro», kiu apartenas al la lerneja laboro. Tio signifas, ke dum du horoj semajne dum la tri lastaj jaroj de la deviga lernejo ĉiu lernanto libere rajtas elekti preskaŭ kion ajn li volas; ekzemple filmkreadon, kuiradon, sporton, rajdadon ktp. Estus multe pli senpece, se oni lernus lingvon, per kio oni ekhavas ŝlosilon al la mondo.

Sed restas tre grava demando: kiel atingi la celon disvastigi esperanton kiel ŝlosilon al la mondo?

Estas facile diri, ke nek ekzistas mono nek personoj, kiuj havas tempon aŭ kapablon realigi tiun celon. Do starigas la demando, kiel havigi tiujn necesajn helpilojn.

Tio kompreneble estas tre malfacila demando kaj mi imagas al mi, ke multaj jam cerbumadis pri tio. Mi tute ne havas solvon, preskaŭ ne iun taŭgan ideon, sed nur kelkajn pensojn, kiujn mi volas iom pritrakti.

Mi kunsentas kun nova esperantisto,

kui prezidas klubon, kaj kiu diris, ke la labormaniero de la esperantistoj de Svedio estas «ŝtonaĝa». Mi diras al mi mem, ke iel kaj rapide kaj grandmase ni devas renaskiĝi, alimaniere ni mortos. Samtempe mi opinias, ke la tempo estas tre oportuna por disvastigi esperanton.

Multaj vojaĝas, «vagadas», laŭ diversaj manieroj tra la mondo kaj deziras havi ne nur suprajn kontakton kun la landoj, kiujn ili travojaĝas, aŭ kun la homoj, kiujn ili renkontas.

Ni starigu al ni tri demandojn:

1. En kiuj lokoj?
2. Per kiuj personoj?
3. Laŭ kiuj manieroj?

1. Eble estos — same kiel faris la SIA-esplorado — plej bone elekti nur kelkajn urbojn en la lando kiel eksperimentajn lokojn: kelkajn grandajn urbojn aŭ urbopartojn de ili, kelkajn mezgrandajn kaj kelkaj etajn. Eble estus bone elekti lokojn kun vigla esperanta klubo, sed tio ne estus necesa, ĉar se la eksperimento bone sukcesus, la grupo fariĝus memstara esperanto-grupo iom post iom.

2. La personoj, kiuj estos elektitaj kiel eksperimentgvidantoj devos havi multajn bonajn ecojn. Ili devos esti gajaj, viglaj, bonaj gvidantoj, bonaj entusiasmigantoj, energiaj, bonaj pedagogoj, bonaj skribantoj kaj parolantoj... Se eblus, ili devos havi eĉ plurajn bonajn ecojn.

3. La elektitaj personoj unue lernos la lingvon kaj la ideon de esperanto kaj la funkciadon de junulara organiza laboro. Kiam la eksperimentgvidanto estos sufiĉe lerta, li skribos en la gazetaro pri esperanto, eniros la lernejojn por informi en matenaj kunvenoj, eble en la klasoj — kaj ne nur unufoje, sed plurfoje. Tiel li interesigos kelkajn pri esperanto kaj povos starti grupon esperantan en «libervole elektita laboro».

Li devos tiel interese, vigle kaj entusiasme instrui al la grupo, ke ĝi «flamiĝos».

Li ja en tiu instrua laboro povos havi diversajn neordinarajn helpilojn, ekzemple skribaĵojn al gejunuloj en diversaj landoj, vizitojn kaj vojaĝojn al alilandaj kluboj aŭ al internaciaj kursoj.

Tiuj diversaj pedagogiaj helpiloj povos esti pozitivaj instigiloj.

Por la instruado en la lernejo la persono havos ordinaran instruistan salajron. Parton de la alia laboro pagu SEF. La restanta mono devos influ el diversaj fontoj, pri kiuj lernis la «elektito» dum sia lernotempo, ekzemple de la socio, de la gazetaro ktp.

Se ni trovos personojn, kiuj havas energion tralabori la unuajn malfacilaĵojn kaj se la esperantomovado celkonscie laboras, mi kredas, ke ni povas vivigi la lingvon kaj la ideon de esperanto en nia lando. Oni diras, ke «akvoguto kavigas ŝtonon», sed la gutoj devas fali sur la saman ŝtonon, kaj ne po unu gutu sur ĉiu ŝtono.

Kerstin Rohdin

## Redan betalt?

*Din medlemsavgift till UEA, alltså. Inte? Då är det hög tid att du gör det!*

*Avgiften för MJ, medlem med årsbok utan tidning är 46,— skr; avgift för MA, medlem med tidning och årsbok är 115,— skr.*

*Tillägg för den som vill vara med i Societo Zamenhof och vill stödja UEA ekonomiskt är 230,— skr.*

*Du betalar till postgiro 14 74 29 - 5, Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.*

# Ni eble petu konsilojn, ne nur helpon!

Kio okazas, se ni vekas konkretan proponon, se parlamentano (aŭ kelkaj parlamentanoj el diversaj partioj) prezentas ĝin en la parlamento?

Estas tia inundo da proponoj pri plej diversaj temoj en la parlamento. La ma-



parlamentano pri liaj interesoj, diskutu lian starpunkton pri la lingva problemo, provi doni aktualan bildon pri la esperantomovado, demandi kion oni povas realisme fari.

parlamentanoj havas kontaktojn kaj spertojn pri la oficiala vivo, kaj tiaj mankas al la esperantomovado. Se ni

parlamentanoj havas kontaktojn kaj spertojn pri la oficiala vivo, kaj tiaj mankas al la esperantomovado. Se ni

povus interesigi malgrandan nombron da diverspartiaj parlamentanoj pri la demando de internacia lingvo, kaj se ili sentus instigon informi pri esperanto, kaj se ni sukcesus teni iom konstantan personan kontakton kun ili, eble iom post iom venus el ilia rondo kelkaj realismaj proponoj.

En ĉiu kazo venus saĝaj konsiloj pri niaj diversaj planoj — konsiloj pri kien turni sin por ekhavi monon kaj oficialan subtenon al tio, kion ni planas. Tiaj konsiloj estas riceveblaj de kiu ajn oficialulo, ne nur de parlamentano. Sed ni devas ie komenci, kaj eble parlamentano povus doni la konsilon kiel daŭrigi.

Ulla Luin

## Tidningar fortsätter skriva om esperanto

«...Av det anförda framgår, att aktivt arbete för esperanto i olika former förekommer runt om i världen. Men varför inte i Sverige? Här är intresset för denna världsviktiga fråga mycket svagt. Pressen är artigt likgiltig, skolöverstyrelsen och Sveriges Radio direkt avvisande. I andra länders TV uppmärksammas de årligen återkommande stora världskongresserna. I Sverige nämner man dem inte med ett ord. [Red.: Insändarskribenten har fel. Se *La Esperanto* 5-6/77] Några länder i Europa och USA har nyligen haft esperantokurser i TV. Otänkbart i Sverige. För den som något lite känner till världsspråkfrågans läge ute i världen förefaller detta svenska snobberi oförklarligt.» (Insändare av Runo Stridell i *Lärartidningen, Folkbladet Östgöten, Motala Tidning* och *Östgöta Correspondenten* augusti-september).

Joritato de ili estas ĝentile malakceptita: «per la ĉi-supraj konsideroj ni opinias, ke la demando estu respondita» aŭ simile.

Necesas tre granda kvanto da laboro kaj preparoj por sukcesigi proponon. Rigardu la konatan ekzemplon el la 60-aj jaroj. Parlamentanoj el pluraj partioj subskribis proponon pri esploro pri la lingva problemo ĉe Unesko. Pluraj personoj laboregis per informado al parlamentanoj kaj aliaj pri la propono, kaj dank'al tio ĝi sukcesis. La laboro ne finiĝis tie. Same granda laboro estis poste farita ĉe Unesko en Parizo, por entute lokigi la skandinavian proponon al la aktuala tagordo de Unesko. Tiu laboro ne sukcesis.

Eble la realisma propono tute ne estas propono.

Eble la realisma agado estus intervjui

grunden oerhört svårt och ordrikt. Britterna själva använder engelskt lexikon då de läser litteratur. Engelska ansågs länge vara det mest umbärliga språket. Franska och tyska dominerade tidigare.

USA:s stora politiska inflytande har säkert inverkat på engelska språkets utbredning. Men det får allt större konkurrens. Franska, spanska, portugisiska tävlar och vinner framgångar, särskilt i de nya stater som växer upp. Engelskan är motbjudande för åtskilliga ryssar och kineser. ...Ingen esperantist drömmer om att esperanto skall bli ett världsspråk som skall ersätta de nationella språken. Nej, hjälpspråk är det rätta namnet och som sådant det enklaste av alla språk.» Sam, kåsör i *Dagbladet, Sundsvall*, den 23 september.

Brev från Lena Blomberg till *Morgonbris* nr 7/77: «Varför inte esperanto? — Rätten att använda sitt eget språk skyddas i Deklarationen om de mänskliga rättigheterna. Det är en självklar rättighet, för språket är en av människans dyrbaraste ägodelar. Men är rättigheten lika självklar i verkligheten? Är det inte i stället så att många människor och länder har fått kämpa en hård kamp för att få använda det egna språket, och kämpar inte många ännu idag för samma rätt?»

Språkproblemen i världen ökar i takt med att de internationella kontakterna ökar. Världen upplever en internationalisering, men samtidigt pågår en nationalisering (många frihetskämpar runt om i världen kräver tillbaka sitt folks identitet, dess särart och egna kultur). Dessa länder blir mindre och mindre benägna att anamma ett annat lands seder, kultur och språk. Samtidigt behöver de — när de väl nått sin självständighet — kontakter med andra länder. Och de behöver få dessa kontakter på ett jämlikt och inte kostsamt sätt...»

Citaten valda av Karl Gustavsson

## Rapidu!

### AVGIFTER VARNA 1978

(gäller till 31 december 1977)

- |                                       |         |
|---------------------------------------|---------|
| 1. Icke medlem i UEA                  | 290 skr |
| 2. Medlem med årsbok                  | 250 skr |
| 3. Medlem med årsbok och «esperanto»  | 190 skr |
| 4. Make/maka till (1)                 | 204 skr |
| 5. Make/maka till (2) eller (3)       | 176 skr |
| 6. Ungdom t o m 20 år                 | 88 skr  |
| 7. Universitetsstuderande t o m 30 år | 146 skr |
| 8. Synskadad                          | 116 skr |

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 d, 217 53 Malmö (tel 040 - 6 52 09). Betalningar till postgiro 14 74 29 - 5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonton, Malmö).

I *ÖC* kritisk replik 28/9: «Världshjälpspråkstanken sticker emellanåt upp i tidningarnas insändarespalter, nu senast i *ÖC* den 16/9. När man läser några sådana insändare frapperas man av deras inbördes likhet. Det är undantagslöst esperanto det gäller och beskrivningen av detta språk består alltid av ohämmat skryt om dess stora framgångar utomlands ... Nog borde väl lite information om språket vara av intresse för den läsekrets som anmodas tycka illa om skolöverstyrelsen och Sveriges Radios snobberi...» (insändare av T. Herlitz) («...undantagslöst gäller det alltså esperanto» — Inget dåligt betyg!)

«I kanten: Lär er språk, lär esperanto! Svenskarna är ett studerande folk, nämnde jag i går på denna spalt. Enbart studiecirkelarna samlar tre miljoner deltagare. Av dessa läser flertalet språk och bland språken kommer engelskan som nummer ett, numerärt sett.

Många tror att engelskan är ett lätt språk. Ytligt sett ter det sig så. Vardagsfraser är lätta att lära. Men det är i

# Libere foliumante tra la esperanto-gazetaro

## ESPERANTO

monata organo de UEA, aperigis en sia oktobra numero paroladon, kiun faris en Rejkjaviko J Régulo Pérez, la homo malantaŭ la eldonejo STAFETO. Tiu parolado estas kvazaŭ 'testamento' de granda eldonisto, kies kulturalan rolon ni ne povas trotaksi.

«Por mi, la ĉeftemo de la kulturosciencoj, de la homosciencoj, estas la lingvo. Al mi ŝajnas, ke la lingvo, en si, kiel produkto de la spirita evoluo de la homo, estas pli grava, pli transcenda, ol ĉiuj religiaĵoj, kiujn oni faras per ĝi, se kiel lingvoreligiaĵojn ni ekzemple konsideras Bibliion, Donkihoton aŭ poemon de Kaloĉaĵo. ... Mi opinias, ke la lingvo estas la plej grava kultura kreaĵo, kiun popolo faras kiel popolo.»

«En tia kompreno, mi simple transiĝis al la kampo de la esperantista *popolo* — kaj sekve al la kampo de la *lingvo* esperanto — la samajn kriteriojn kaj celindaĵojn, kiujn la lingvistiko kaj la filologio aplikas al gentaj lingvoj. Ĉar esperanto, jes ja, estas, kvalite, tiel genta aŭ landa lingvo kiel la novhebrea en Izraelo, papiamento en Kuracao, svahili en mezorienta Afriko, la hindia en Hinda Unio ktp, kaj malpli artefarita ol ekzemple la estona. Por mi, do, esperanto *jam* venkis, kiel unika, memstara, tutplaneda kultura fenomeno.»

«Venkito dum la hispana interfrata milito de la tridekaj jaroj, dum kvardek unu jaroj ekzilito en mia propra lando, dank' al esperanto el ĉiuj partoj de la tero venis homoj-mondo, animoj-libroj por loĝigi mian dezerton. Kun ili mi klopodis kunlabori, kunloĝi, kun-kreski, kiel eble plej sindevontige. Kelkfoje mi, supozeble, sukcesis; kelkfoje



certe ne. Sed kiel ajn, dank' al vi, samideanaj proksimuloj, dum tiuj lastaj dudek kvin jaroj, mia biografio ne estis homarana vakejo, mia vivo ne estis solidare malplena...»

## KONTAKTO

la kvaronjara revuo de TEJO, dediĉis parton de sia aŭtuna numero al la nuklea debato, demando tre aktuala, ne malplej por ni svedoj.

Interesa estas la enkonduka artikolo pri la nuklea debato en Novzelando. Ŝajnas, ke la problemoj de tiu nia antipodo, sufiĉe similas al niaj, kun la escepto, ke ili ankoraŭ ne havas nuklean energion.

«Estas la nuboj de nuklea enplektiĝo kiu nun preme kuŝas sur Novzelando. ... Kiu konas la landon demandus, kiel diable tio povus estiĝi. Ĉu ne temas pri lando tre izolita de la ĉefaj nukleaj na-

cioj, kun limigita industrio, kaj kun nur 3 milionoj da loĝantoj sur areo proksimume samgranda kiel Britio (ĉ. 80 milionoj) kaj Japanio (ĉ. 110 milionoj)? La longa mallarĝa insularo kaptas abundan pluvofalon, kiu kaskadas el la montaro laŭ tiaj riveroj, kiuj facile provizas hidropovon. Troviĝas ĉe Huntly kaj ĉe la okcidenta bordo karbodeponoj; ekzistas geotermaj zonoj kun utiligebla vaporo, kaj oni nun trovas nafton kaj gason sub la apudaj maroj.

Sed same kiel ĉe ni, la utiligo de la akvofortoj kaŭzas grandajn vundojn en la naturo, detruas loĝlokojn kaj kulturajn regionojn, kaj formiĝis protestogrupoj. La aliaj energifontoj evidente ne sufiĉas por la kreskantaj bezonoj de la grandaj industrioj, kaj la registaro, komence sekrete, esploris pri la eblecoj utiligi nuklean energion. Oni fondis reĝan komisionon (Novzelando apartenas al la brita reĝa imperio), kiu plue esploru la demandon.

«Reagoj al la komisiono? Jen du: Ĝi estas unika — kaj signifas, ke Novzelando estas la unua lando plene kaj publike debatanta nuklean povon antaŭ ĝia enkonduko. La nuklea decido estos farita de la registara estraro — manpleno da mezaĝaj viroj, kies juĝpovo en multaj kazoj estas eroziita alterne de egoismo kaj pragmatismo; iliaj konceptoj ostigitaj de aĝo kaj kutimo, kaj ilin karakterizas la entuta akcepto de kreskekonomio.» — «Ĉu eblas eviti la bezonon per pliaj paŝoj: anstataŭ plani laŭ la kresko, plani la kreskon mem?» «La protestogrupoj aktivis, akcentante, ke ne temas ĉefe pri teknika debato, sed pri moralaj demandoj, kiuj tuŝas la tutan vivkoncepton, kaj pri kiuj ĉies opinio estas valida.»

*Kontakto* enhavas, krome, artikolon pri «Seveso — unu jaron poste», pri «Religio kaj futuro», pri «Kolonioj en la kosmo» kaj aliajn. Ĝi estas unu el la plej aktualaj revuoj de la esperantomondo, kaj ne nur gejunuloj, sed ankaŭ maturaj esperantistoj povas ĝin legi kun ĝuo kaj plezuro.

## Libro ~ donaco, kiu restas

Por kristnasko kaj novjaro ni proponas:

**LA FIANĈO DE L'SORTO**, nova originala romano de J.H. Rosbach pri du norvegaj kuzoj antaŭ kaj dum la dua mondmilito. «Arta triumfo, grava romano, eleganta stilo» (el recenzo) **52,50**

**KOKO KRIAS JAM**, longe atendita novapero de la ŝatata originala novelaro de F. Szilagy. Kolekto de majstronoveloj, konsiderata kiel la ĉefverko de Szilagy. **48,25**

**LA NORMANDAJ RAKONTOJ** de G. de Maupassant, tradukis R. Dupuis, nun denove havebla. Ilustrita, unuaranga franca literaturo, la perfekta bela donaco al gemikoj — aŭ al vi mem. **40.-**

Ne forgesu pri la ĉiam interesa **KREDO FLOROJ DINAMITO**, originala biografio de E. Olsson pri Birgitta, la sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, kaj pri Nobel, la industriisto kaj inventinto de dinamito.

Broŝurita **13,25**

Bindita **18,10**

*Cetera ni povas havigi al vi ĉion el la nova librokatalogo de UEA.*

**ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

Fack, 200 42 Malmö, poŝtĝiro 578 - 5

## INFORMILO

la organo de Sveda Esperanta Fervo-  
jista Asocio, prezentas en numero 2-3  
1977 interesan (svedlingvan) artikolon  
pri Ĉinio. Oni rakontas pri la hejmo  
por maljunuloj en Tientsin. Ne estas,  
kiel ĉe ni, kutime ke gemaljunuloj lo-  
ĝas en apartaj hejmoj. Estas honoro  
por la junaj familioj zorgi pri siaj mal-  
junaj gepatroj. Sed troviĝas maljunuloj  
sen infanoj. Por ili estas la hejmoj por  
gemaljunuloj. Ĉi tie ili tamen ne bezon-  
as senti sin ekster la kunvivado. Venas  
ĉi tien por vizito infanoj de la lernejoj.  
Kaj oni sendas la gemaljunulojn al la  
lernejoj kaj laborejoj por ke ili tie ra-  
kontu, kiel estis en malnovaj tempoj.  
Tio estas vivanta historio, interesaj viv-  
rakontoj.

## SENNACIULO

organo de SAT, publikigas daŭre la tu-  
tan protokolon de sia kongreso, kiu ĉi-  
jare okazis en Augsburg. Oni detale pri-  
skribas la solenan malfermon kaj refe-  
rumas la diversajn parolojn. En la ra-  
portoj de la sekvantaj tagoj oni rapor-  
tas pri diskutoj pri la internaj raportoj  
de SAT, ekzemple pri la financoj. La  
multjara sekretario Bartelmes faris pre-  
legon pri la historio de la SAT-kongre-  
soj. Li akcentis la gravecon de la kon-  
greso en la vivo de SAT. SAT estas en-  
tute interesa organizaĵo, kiu respegulas  
la debatojn pri la ideala socio, precipe  
tiujn debatojn, kiuj okazas en la inter-  
nacia laborista movado. La esperantis-  
toj aktivaj devas kun atento sekvi tiun  
debaton

**Åke Blomberg**

## SCIENCA MONDO

La revuon eldonas «Monda federacio  
de sciencaj laboristoj» kun 300 000  
membroj en 33 organizoj en 28 landoj.  
Ĝi estas fondita en 1948 kaj havis kiel  
unuan prezidanton prof. Joliot-Curie.  
Ĝi volas labori «por paco kaj interna-  
cia kompreno, por kunlaborado de sci-  
encistoj el ĉiuj landoj». Ĝis nun la re-  
vuon aperis en la lingvoj angla, franca,

germana, rusa. De volumo 20 (1976) ĝi  
aperas ankaŭ en esperanto. Redaktoro  
por la esperanta eldono estas prof. Pe-  
evski. Ĝi aperas en Bulgario kvarfoje  
en la jaro kaj kostas 1 usonan dolaron  
po jaro por abono.

Kun intereso mi ekstudis la unuan  
volumon. Geografie la artikoloj venis  
el la sferoj okcidenta (11), orienta (11),  
tria mondo (5). La temoj estis pri me-  
dio (11), medicino (4), politiko (4), pri  
aliaj temoj nur unuopaj artikoloj.

Kvankam kelkaj artikoloj estis tre  
legindaj, ekzemple pri parazitaj malsa-  
noj, mi perdis la esperon trovi ĝenerale-  
sciencan objektivan revuon. La plej  
multaj aŭtoroj uzas socialismajn kli-  
ŝojn:

«levigi la demokratian potencoj, kaj  
en kelka mezuro ankaŭ la marksistan  
potencon inter la universitataj profes-  
oroj» (1, p 29), «superreganta kaj impe-  
rialisma karaktero de la multnaciaj so-  
cioj» (3, p 10), «kapitalismaj landoj ko-  
mencis konstrui rapide nukleajn reak-  
torojn ... Sovetunio kaj la aliaj socialis-  
maj landoj, kontraŭe ...» (4, p 13).

Pro tiaj trajtoj la revuo aperas kiel  
socialisma propagandilo, sen la scienca  
objektiveco, kiun oni postulas en nia  
lando.

## LA ESPERO

aperis per nro 6 de la dua volumo, ko-  
lorriĉa kaj kun bildo de ora krono el  
la 5a jarcento sur la kovrilo Ĝi venas  
el Koreo (la lando kvietmatena) kaj es-  
tas tre bone redaktita kaj bele presita.  
Per la interesa artikolo pri religio kaj  
arto oni ekscias, ke estas 12 milionoj da  
budhanoj en la lando kaj preskaŭ 6 mi-  
lionoj da kristanoj. En la ĉefurbo Seŭlo  
oni provas anstataŭigi la kolombojn  
per pigoj. La pigoj estas bonaj aŭgu-  
rantoj, laŭ la popola kredo.

Korea Esperanto-Asocio eldonas  
ankaŭ pli modestan, multobligitan mon-  
natan revuon, *Esperanto*. Ĝi estas re-  
daktita kaj en la nacia lingvo kaj en es-  
peranto.

**Salex**

# pre nu mer e ra!

<b>Heroldo de Esperanto</b>	<b>56,00</b>
<b>Kontakto</b>	<b>34,50</b>
<b>Oomoto</b>	<b>22,00</b>
<b>Sennaciulo</b>	<b>61,00</b>
<b>Literatura Foiro</b>	<b>25,00</b>
<b>Kulturaj Kajeroj</b>	<b>30,00</b>
<b>Norvega Esperantisto</b>	<b>16,00</b>
<b>El Popola Ĉinio</b>	<b>20,00</b>

## ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö  
postgiro 578 - 5

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



## YTONG AB

YXNULT  
GRUPPEN

## Forta kiel Tarzan

—Paĉjo, ĉu vi estas pli forta ol Tarzan? demandis Jens subite iun tagon, kiam ni kune promenis en la arbaro.

—Multe pli forta, mi diris. Estis eble iom troigite, sed mi ja deziras, ke la knabo respektu min. Li nome estas la sola, kiu iam faris.

—Ĉu vi povas renversi arbon per la manoj, kiel Tarzan? li demandis.

—Ha jes, mi diris. Nun mi ja jam komencis la aferon.

—Ĉu grandan arbon?

—Arbon kiel ajn, mi diris.

—Provu renversi unu, li diris.

—Ne, mi diris. Oni ne rajtas pro la Arbara Komisiono. Alie mi volonte farus.

Tiun argumenton li akceptis, kaj ni daŭrigis la promanon. Kiam ni iris kelkajn minutojn, ni renkontis subite viron kun ĉapo. Estis la arbara intendanto. Jens tuj rekonis lin, kaj an-

# POR FINI

taŭ ol mi povis malhelpi, li alparolis la viron.

—Ĉu mia patro rajtas ricevi permeson por renversi arbon per la manoj? li demandis.

—Ĉu per la manoj? diris la arbara intendanto. Mi ne kredas, ke via patro tion povas.

—Ja li povas, diris Jens fervore. Tion li mem diris. Li estas multe pli forta ol Tarzan.

La arbara intendanto observis min dum momento kaj aspektis kvazaŭ li dubas pri la ĝusteco de la aserto. Poste li ridetis en tiel stranga maniero.

—Se vi vere povas fari tion, li

diris al mi, vi ja rajtas renversi duon da arboj.

—Ho paĉjo, jen faru ĝin, diris Jens ravite.

—Mi portas mian novan mantelon, mi diris kaj forrapidis kun la knabo.

—Ah ba, vi nur ne povis, diris Jens, kiam ni pluiris.

Mi ne respondis. Miaj pensoj estis direktitaj al formulado de skriba plendo al la arbara kontrolisto. Mi estas tucerta, ke arbara intendanto ne havas la rajton doni tiuspecajn permesojn.

**Finn Søbørg**  
*Eldanigis g. s.*

## Dialogo por plenkreskuloj

—Ĉu vi amas min? diris la knabino.

—Mi ne scias, diris la knabo. Mi kredas tion.

—Sed vi ĉiam volas kisi min, diris la knabino.

—Jes, tion jes, diris la knabo.

—Ĉu vi ŝatas mian patrinon?

—Ĉi diris.

—Kaj la patron? diris la knabino.

—Li parolas tro multe, li diris.

Nun la knabino diris nenion pli, sed envolvis sin per sia nova kaj iom tro maldika mantelo kaj iris iom pli longe for de la knabo ol ŝi faris antaŭe.

La knabo rimarkis nenion. Li diris nur, kiel estis. Li volis fakte iri en kinejon. Sed la knabino diris, ke ni hodiaŭ ne bezonas iri en kinejon. Ĉiam en kinejon. Ĉu ni ne povas paroli klare anstataŭe?

—Klare, la knabo diris. Paroli klare pri kio?

—Ni estas plenkreskaj, diris la knabino, kaj nun ili iris unu ĉe la alia kaj estis plenkreskaj.

En silento.

Ĝis kiam la knabo diris: Ĉu estas certege, ke vi ne volas kuniri al kinejo?

—Kiel vi povas, diris la knabino. Nun, kiam ni parolos klare pri ĉio.

—Mi nur demandis, diris la knabo. Tiu en Ricardo estos terure bona. Oni ja povas demandi.

—Ĉu vi havas nenion alian por demandi? ŝi diris. Ĉu tio

estas via sola? Ĉu tio estas ĉio, kion vi scias demandi? Iru en kinejon. Se vi ŝatas ĝin. Kiaj senesperaj demandoj. Ni estas plenkreskaj nun.

—Jes, estas eble, ke ni estas, diris la knabo.

—Do oni devas montri tion, diris la knabino. Tiam oni devas decidi.

Nun la knabo komencis frosti kaj pensis, ke oni povas en plej malbona kazo iri al Virans kaj trinki kafon. Eĉ se estas la fundo iri al Virans, kiam oni estas plene dek ok.

—Ĉu ni iru al Virans, tiel ke vi povas paroli, diris la knabo.

—Virans, diris la knabino, kaj tie sidas ĉiuj viaj kamaradoj kompreneble kaj parolas pri hokeo. Vi ja diris, ke vi amas min.

—Mi pensis nur se vi frostas, diris la knabo.

—Al Virans iras nur knabetoj, diris la knabino.

Kaj ili daŭrigis la iradon en silento. Ili preterpasis Virans. Tie sidis amaso da gejunuloj kaj trinkis. Ili estis iom junaj, kompreneble. Estis tie, kie li kaj ŝi renkontiĝis antaŭ proksimume unu jaro. Pensu, kiel rapidas la tempo, pensis la knabino. Mi frostas, pensis la knabo. La horo estas dek kvin al la naŭa. Post kvaronhoro komenciĝas la kinejo.

—Ni neniam parolis unu kun la alia, diris la knabino.

—Ni ja faris tion, diris la knabo.

—Neniam serioze, diris la knabino.

—Eble ne, diris la knabo kaj malrapidigis la iradon por ne veni tro longe for de la kinejo, se ili ŝanĝos opinionon.

—Ni eble estos kune la tutan vivon, ŝi diris.

Kaj ŝi pentis sin. Tio estis io, kion oni ne diras.

—Ĉu estas certege, ke vi ne volas kuniri al kinejo? diris la knabo.

—Ĉu tiu filmo estos bona? diris la knabino.

Nun la knabo fariĝis entute varma kaj feliĉa. Kompreneble li ŝatis Ulla. Ulla estis perfekta. Iom malfacila kelkfoje, sed tiaj ja estas ĉiuj knabinoj.


—Ulla, li diris. Ĝi estos tia treege bona. Vi kuniras.

—Jes, diris la knabino. Kompreneble mi kuniras.

—Bonege, diris la knabo. Bonege. Mi ŝatas vin terure.

**Pär Rådström**

*Tradukis el la sveda F. Luin*



*Parolante pri la neŭtrona bombo — Carl Z. pensas pri tute alia armilo*

Carl Z



## La nova batalilo

La nova batalilo kaŭzas nenian eksplodon, nenion premondon, nenion varmondon. Tamen ĝi havas pli revolucian efikon ol iu ajn alia batalilo en la historio.

La nova batalilo neniigas ĉiun militistan pensadon sur tereno de ĉirkaŭ dudek kvin kvadratkilometroj. Ĝi ne influas la civilan pensadon sur tiu terspaco, kaj la militistaj pensuloj restos korpe tute sen difekto, samkiel la konstruaĵoj kie oni iam pensis militiste. Ĉio ĉi ebligas al la civiluloj rapidan transprenon de la tereno kaj lokigon de batalil-navigantoj, militistoj kaj politikistoj en civilan laboron.

La nova batalilo estas totala batalilo, tiamaniere ke ĝi efikas ne nur je tiuj, kiuj rekte laboras en la servado de la milito, sed ankaŭ je ties laboradanto.

Do: je la grandindustriistoj, iliaj bankoj kaj subaĉetitaj ministroj.

La nova batalilo transmetas dum tri ĝis kvar semajnoj ĉiujn militantajn batalionojn en paccan laboron por prizorgi la ter-

globon.

La nova batalilo kapabla translokigi monon de iu regiono al alia. Dum daŭro de unu monato ne plu restos eĉ unu dolaro nek unu krono en la militindustrio; ĉiu ĉi mono tute sendifekto transiros al rekonstruo, aŭ al detruo de la jam ekzistantaj armiloj.

La nova batalilo verdire malobligas estontece militistan pensmanieron, sed ĝi samtempe havas daŭran efikon, tiel ke ĝi konstante memorigas pri ĉiu malhomeco kaj krueleco de la mono kaj militiloj dum historia tempo.

La nova batalilo ne havas nomon.

Socialismo, humanismo, pacifismo, saĝo, solidareco, maturreco, kuraĝo, religio de la amo — oni ne povas elekti iun el ĉi tiuj nomoj. Ĉio evidentiĝas, ke la nova batalilo devas havi ĉiujn ĉi nomojn, eventuale eĉ pliajn.

*Tradukis el la sveda laŭ permeso de la aŭtoro*  
**Tiberio Morariu**